



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
International League of Esperanto-Speaking Teachers
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlands; www.ilei.info

Les Brenets, CH, 2016-08-20

Al la estimataj membroj de ILEI, de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Esteemed members of ILEI, the International League of Esperanto Teachers:

Mi kun granda ĝojo sciigas al Vi ĉiuj, instruistoj aŭ subtenantoj de la Ligo, al nia membraro, ke ni okazigas en 2017 la 50-an ĉiujaran tutsemajnan kunvenon de ILEI en la urbo Busan en Suda Koreio.

With great joy I inform you all, instructors or supporters of the League, all ILEI members, that in 2017 we will hold our 50th annual one-week convention in the city Busan in South Korea.

Pri la organizado kaj pretigado de la evento zorgas la ILEI-sekcio de Koreio. La kandidatiĝdokumento estis kompleta kaj kontentiga, jam la loka skipo laboras altnivele kaj akurate. Nia estraro povis akiri la konvinkon, ke la urbo Busan estas por nia venontjara kongreso la plej taŭga en ĉiuj konsiderendaj kampoj.

The organization and preparation of the event is to be taken care of by the Korea Section of ILEI. The proposing application has been completed and is in good order. The local staff is already at work at a high level and is up-to-date. Our executive committee has determined that the city Busan is the most suitable in all relevant ways for our next year's convention.

Klare vidante, kiel aktivaj estas niaj koreaj amikoj kaj kiel favoran gastamon havas Koreaj priturismaj Organizoj Korea Turisma Organizaĵo (KTO) kaj Busana Turisma Organizaĵo (BTO), la estraro de ILEI atingis la konkludon kaj faras oficialan anoncon per jenaj vortoj:

It is clearly evident how active our Korean friends are and what a favorable hospitable attitude the Korean tourist organizations, the Korean Tourist Organization (KTO) and the Busan Tourist Organization (BTO), have. Consequently, the ILEI executive committee has come to this conclusion and makes the following official announcement:

Nia decido klaras: ni kunvenos en Busano en 2017, espereble kun 200 personoj aŭ pli.

Our decision is clear: we will convene in Busan in 2017, hopefully with 200 persons or more.

Danke al ĝia daŭra grandiĝo, ekde la 50-a internacia evento, anstataŭ 'konferenco' ILEI prenas por ĝi novan nomon 'Kongreso'.

Thanks to our continuous growth, beginning with our 50th international event ILEI will use for its new name "Kongreso" ("convention") rather than "Konferenco" ("conference").

Konsekvence la estraro de ILEI tre esperas, ke multaj el vi partoprenos la 50-an kongreson de ILEI en Koreio, en urbo Busan (en Esperanto Busano), en tre granda kaj moderna kongresejo Junulara Gastejo 'Arpina'. La datoj jenas : 2017.07.15 ~ 22.

Consequently the ILEI executive committee very much hopes that many of you will participate in the 50th ILEI convention in Korea in the city Busan (in Esperanto "Busano"). It will be held in a modern convention center, the Young People's Hostel "Arpina." The dates are July 15-22, 2017.

Ni tenos vin informitaj tra la jaro pri ĉiuj aspektoj de nia Kongreso, de ĝia programo, de la loĝebloj, de la ekskursoj. Sendube vi havos emon konatiĝi kun tiu mirinda lando Koreio. Sendube vi havos emon pasigi semajnon en internacia etoso por lertiĝi kaj malkovri la korean kulturon. Jam nun ni diras "Dankon!" "Kamsahamnida!" al niaj koreaj kolegoj kaj al la helpopretaj turismaj instancoj lokaj.

We will keep you informed throughout the year concerning all aspects of our Convention--its program, its lodging possibilities, its excursions. Undoubtedly you will want to become acquainted with the amazing country of Korea. Undoubtedly you will want to spend a week in an international atmosphere in order to learn about and discover the culture of Korea. Already now we say "Thanks!" « Kamsahamnida » to our Korean colleagues and the helpful local tourist organizations.

Mireille Grosjean



Elkore salutas

Kind regards

Mireille Grosjean
Prezidanto de ILEI

Mireille Grosjean
President of ILEI